

Konsilia skajpa diskuto, la 9an de junio 2010

Ĉeestintoj:

Konrad Gramelspacher
Bertrand Hugon
Stanislaw Rynduch
Guillem Gomez Blanch
Eduardo Kozyra
Alfred Schubert
Eugen Macko
Fabien Tschudy

Diskuto pri organizado de la federacia kunveno en Alsoors.

Eduardo atentigas, ke okazis inundoj, kiuj povus malhelpi al poloj atingi Budapeŝton.

Retrorigardo pri la franc-germana kongreso en Kaiserslautern

- **Jarkunveno de EDE-germanio**

EDE-germanio elektis novan estraron:

Prezidanto: Konrad Gramelspacher

Vicprezidanto: Eugen Macko

Asesoroj: Manuel Cebulla, Alfred Schubert, Steffen Eitner

Kasistino: Monika Finnegan-Reuß

Kaskontrolistoj: Marianne Buchholz-Maurer kaj Ulrich Matthias

La propono de Ulrich Matthias transpreni la gvidadon de EDE kiel Unu mondo Partio estis rifuzita.

La propono de Manuel Cebulla transloki la oficialan sidejon (poŝtadreson) de EDE de Wiesbaden al Berlino estis akceptita.

- **Prelegoj de Eugen Macko kaj Fabien Tschudy**

Ĉeestis 30 homoj, kiuj starigis demandojn fine.

- **Prelego de Ulrich Matthias pri Unu mondo**

Elisabeth Barbay ĉeestis. Ŝajne, Ulrich komparadis EDE kun UM.

Alfred Schubert dum la skajpkunveno pri tio diras, ke 0,04% por EDE en 2009 estas nenio, EDE ne trafis la ĝustan temaron. Nuntempe gravas en Germanio ekonomio. Eugen respondas, ke oni ne povas fari, kion faras la grandaj partioj.

Interveno de Guillem pri EDE ĉe la valenciaj esperantistoj

La kunveno ne estis ne ege fruktodona, sed 2 homoj eble povus kunagadi en EDE. Guillem, kiel sola EDE-ano ankaŭ ĉeestis la alternativan foiron de Valencio, kiun ankaŭ ĉeestis la kataluna nacia maldekstra KEA kaj SAT. Venis ankaŭ radiostacio de kvartalo de Valencio, kiu petis semajne au monate programojn pri esperanto. Post diskutoj kun esperantistoj, Guillem diras ke ili ne sentas bezonon de partio, sed ili bezonas influi politikistojn. Kaj esperantistoj kiuj volas partion ne volas nur prilingvan partion. Multaj homoj pensas, ke la europa modelo kaj hispana modelo estas en danĝero, ĉar ilin atakas bankoj. Funkciuloj strikas, oni antaŭvidas ĝeneralan strikon. Europa striko. Mankas europa perspektivo kaj tiu bezono mankas. EDE povas havi iun rolon pri tio. Guillem ĉeretigos bildojn de la kunveno.

Fondo de EDE-Pollando

Ĉeestos la 7an de julio nome de la estraro Eugen Macko.

EDE dum someraj aranĝoj

Okazos nenio pri EDE en Kubo. Dum Festo, eble okazos io. Almenaŭ prelegos Bertrand Hugon pri demokratio.